

Eduard Möricke,
Je l' nova jar'

tradukita de Manfredo Ratislavo

Samkiel sekrete,
mallaŭte, paŝete
suriras la teron
anĝel' de l' Sinjor',
alvenis la tago.
Ho, bonan matenon!
Ni diru bonvenon!
Alportu ĝi benon!
Jubilu la kor'!

En Li la komenco!
Per Lia potenco
moviĝas la tuta
stelar' super ni!
Vi, patro, Vi stiru!
Ja estas nenio
sen vi, kara Dio!
Al vi estu ĉio
lasita de mi!

*Traduko de la Germana poemo "Zum neuen Jahr" de EDUARD MÖRICKE (Eduardo Mojriko, *1804-09-08 – †1875-06-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1982-01-10.*

MR-021-7a / Arg-275-557 (2012-12-26 15:44:28)